

Renkontiĝoj de AVE-anoj:

2020-05-30 Frankfurt & Slubice, okaze de Germana & Pola Eo-Kongreso. Eble je UK en Montreal

Okazis inter aliaj:

2019-07-20 Lahti (FI), kunveno de AVE okaze de la UK

2019-07-11 BET, Panevezys: plastajhoj & akvaroj

2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE-informtablo je movada foiro.

2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), teamo de AVE ĉe la Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj: globalgreens.org kaj greens2017.org - pri lingva justeco ene de la Verduloj;

2016-07-16/23 SAT-Kongreso en Herzberg - okazis kunsido de la ekologia frakcio- AVE kunlaboras

2015-07-27 **Lille**, Francio, publika AVE-kunsido okaze de la 100-a UK de UEA;

temoj: Agendo 21 & Daŭropovo en la Esperanto-Movado. Trinkakvo por Kalima.

Niaj Celoj: La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj (au NRO-oj) pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ni informas niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

Historio de AVE: AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj (vidu AVENO34). Sur nia retejo troviĝas nia bulteno AVENO 00 - 41

Kunlaboro: AVE kunlaboras kun UEA kaj SAT, krome kun diversaj Civil-Sociaj Organizaĵoj kaj kun la Verdaj Partioj de landa, kontinenta kaj globala nivelo.

Agado: Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo.
Temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, nemilita konflikt-solvado.

Ni subtenas evoluajn projektojn de esperantistoj en Afriko: www.verduloj.org/afriko.htm
: «Mazingira Salama/Ketare» de Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio, apud Bunda
: «Akvo por Kalima» de PIEADC, Etienne Katchelewa en Kalima (Maniema, orienta D.R.Kongo)

Ni subtenas per informado kaj tradukado la **Verdajn Partiojn tutmonde:**

Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar), <http://www.globalgreens.org/globalcharter>
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.),

Programo de la Europa Verda Partio, 2006; Manifestoj de 2009 kaj 2014

Verdula Libro, Verda/EFA EP-Frakcio, 2004-2009

: informo kaj **tradukado** de gravaj tekstoj de la **Verda Movado**

100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio (kun multaj ligiloj)

Plastajhoj en la akvaroj & kemiaĵoj en la plastajhoj.

Bonvolu viziti nian retejon: www.verduloj.org/dokument.htm

Diskutejo: Verduloj troviĝas sur Ipernity.com, rekte: <http://www.ipernity.com/group/227876>

Por **membriĝi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn Celojn, AVE havas ch. 340 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio por nia statistiko. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando - ligoj:
Federacio de la Verdaj Partioj en Afriko: <http://www.globalgreens.org/federations#africa>

Kotizo: Nia jara kotizo estas libervole paginda - propono: 5 EUR, plia donaco por nia evolu-subtena agado bonvenas. **UEA-Konto de AVE:** „avex-z“ au pere de la konto de UEA che ABN-Amro, IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99, BIC: ABNANL2A
Ne forgesu mencii: ("via nomo" por Konto avex-z)

AVE-sekretario: Kiel sekretario de AVE mi invitas vin elkore, partopreni en nia agado kaj informi niajn ne-esperantistajn geamikojn en ekologio-socialaj (verdaj) partioj aŭ NRO-oj pri Esperanto. Mi preferas koncizajn tekstojn, en formato .txt, au .rtf, kaj literumadon (ch..u, cx...ux)

Adreso: AVE, c/o Dr. Manfred Westermayer

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, manfred@westermayer.de, www.verduloj.org

AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj

Ni pensas tutmonde & agas surloke kaj regione

